

## SEPA RENDEVUO DIDAKTIKA:

### strukturŝanĝaj ekzercoj

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1992 marto 05 & 07

Cl.- Svisa Radio Internacia invitas vin hodiaŭ al sepa rendevuo didaktika kun gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND.

A.- La pasintan semajnon vi diris, ke ekde la unuaj lecionoj de esperanto vi ŝatas instrui la lingvon helpe de tekstoj, kiuj respegulas la originalan literaturon. Ĉu ni povus doni ekzemplon?

Cl.- Ni multe parolis pri la instruado al tutkomencantoj. Hodiaŭ ni konsideru, ke ni devas instrui al progresantoj. Mia celo estas: riĉigi ilian vortprovizon, veki ilian legemon, malkovrigi al ili stilajn eblojn de esperanto. Por tiu ĉi celo mi ege ŝatas legigi la novelon de Julio Baghy titolitan "La Teatra korbo, senpretenda babilado". Tiu aŭtobiografia rakonto estas leksike riĉa, stile varia, verke vera juvelo multfaceta kaj emociiga. Ju pli oni legas kaj analizas ĝin, des pli oni sentas, ke ĝi estas unu el la ĉefverkoj de la aŭtoro de "Viktimoj" kaj "Sur Sanga Tero". Por doni ideon pri la karaktero de tiu novelo, ni eklegu la tri unuajn paragrafojn. Mi tuj atentigas vin, ke ni ne povus trovi pli taŭgan tekston por la trastudo de la korelativoj aŭ tabelvortoj:

A.- "Iam, ie estis korbo, duonmetron alta kaj iom longe ovala. Nenio eksterordinara karakterizis ĝin. Ĝi estis nek pli arta, nek malpli bela ol ĝiaj korbofratoj. Solida manplektaĵo el salikaj vergoj. En la laca kapo de metiisto nestis ĉiutagaj panzorgoj dum liaj kalokrustaj manoj donis formon al la korbo.

Cl.- "Honesto laboro meritas atenton, fortika korbo trovos aĉetanton, - tiel povis pensi la zorgpremata simplulo, ĉar li faris ĝin rimarkinde rezistkapabla... Kaj ĝi trovis aĉetanton. En tiu tago freŝa pano kvietigis la malsaton de grandnombra familio. Almenaŭ estas supozeble, ĉar en kabano de la malriĉulo ĉiam abundas la panpetaj buŝetoj.

A.- "La korbo komencis sian devokonscian vivon. Ĝia principo estis: "Honesto laboraĵo honeste servas". Fidele ĝi gardis ĉion, kion la gemastroj metis en ĝin. Ĝia enhavo konstante variis. Komence la korbo estis tre amuzata de la vestospecoj. En ĝi sinsekve alternadis: reĝa trenaĵo kaj almozula sako, kavaliraj botoj kaj kamparanaj bastŝuoj, pastra robo kaj jakobena ĉapo, kruco kaj glavo, kasko kaj arlekena kapornamo. Ĉiuvespere ĝi estis portata en grandan vestejon, kie ĝi renkontis multajn korbojn, similajn al ĝi. Ĉiuvespere ĝi devis esti la atestanto de aliformiĝo de sia mastro."

Cl.- Vi tuj konstatas, ke pere de tiu ĉi teksto la lernantoj malkovros multajn novajn vortojn. Tial oni ne antaŭeniru tro rapide en la legado. Por havi la okazon multfoje rediri tiujn vortojn, oni ne hezitu proponi strukturŝanĝajn ekzercojn. Sed la unua propozicio aŭ pensunuo jam okupu nin momenton. Vi relegu ĝin:

A.- "Iam, ie estis korbo, duonmetron alta kaj iom longe ovala."

Cl.- La piloto aŭ subjekto sekvas la kernvorton aŭ verbon.

A. - "Estis korbo."

Cl.- "Estis" estas unuliga kernvorto, aŭ por uzi greklatinajn vortojn estas netransitiva verbo. La studo de tiu novelo de Julio Baghy malkovrigos al la lernantoj, ke la subjekto aŭ piloto, ĝenerale sekvas la unuligan kernvorton, la subjekto sekvas la netransitivan verbon. Unu strukturŝanĝa transformo, kiun mi ĉiam proponas, kiam ni havas la verbon esti, estas simple ĝin forigi profite al la senpera verbigo de la eblaj adjektivoj. Vi provu dirante ambaŭ pensunuon, la originalan kaj la transformitan:

A.- "Iam, ie estis korbo, duonmetron alta kaj iom longe ovala." "Iam, ie korbo donmetron altis kaj iom longe ovalis."

Cl.- Tio montras, ke la kernvorto ne nur estas la verbo "estis", sed la kunmetaĵoj "estis alta kaj ovala". "Estis korbo alta kaj ovala" povas diriĝi en esperanto per la helpo de la verbo esti aŭ sen ĝi: "Korbo altis kaj ovalis". Tio malkovrigas la internaciecon de esperanto. La franca kaj la plimulto el la eŭropaj lingvoj nepre devas uzi la helpverbon esti, ĉar ili ne kapablas senpere verbigi adjektivojn. Aliaj lingvoj ne posedas tiun helpilon esti kaj rekte formas verbojn el adjektivoj. Ĝuste pro sia internacieco esperanto posedas ambaŭ eblojn. Tion la esperantistoj trankvile malkovras, sed ankoraŭ ekzistas kelkaj esperantologoj, kiuj rifuzas al esperanto tiun eblon, inter ili okupas ĉeflokon Rikardo Ŝulco.

A.- Kiel vi klarigas la konstruon "duonmetron alta".

Cl.- La vorto "duonmetron" influas la signifon de la vorto "alta". Baghy estus povinta diri "duonmetre alta", sed tion li evitis, ĉar tri vortojn poste li havas "longe ovala". Li evitas internan rimon kaj monotonecon. Li estus povinta ankaŭ diri "je duonmetro alta" aŭ "je duona metro alta", sed tute certe eŭfonie li preferis "duonmetron alta". Kun la lernantoj ni ekzercu la kvar formulojn kun kaj sen la helpverbo esti. Tio donas ok eblojn:

A.- "Iam, ie estis korbo, duonmetron alta. Iam, ie estis korbo duonmetre alta. Iam, ie estis korbo je duonmetro alta. Iam, ie estis korbo je duona metro alta. Iam, ie korbo duonmetron altis. Iam, ie korbo duonmetre altis. Iam, ie korbo je duonmetro altis. Iam, ie korbo je duona metro aitis."

Cl.- Strukturŝanĝaj ekzercoj estas tre gravaj. Ili ebligas profunde asimili la esprim-eblojn de la lingvo kaj la signifon de la vortoj. Pere de tiuj ekzercoj oni antaŭeniras per paŝetoj. Plurfoje ni diris, ke per la ciferoj 1, 2, 3, 4 kaj 5 oni povas facile indiki la gramatikan kodon de pensunuoj. Ni rememorigu, ke la kernvorto kodiĝas per 0, la piloto per 1 kaj la nepilotoj per 2 se troviĝas la finaĵo n, per 3 se ĝin karakterizas prepozicio, per 4 se ĝin karakterizas la finaĵo e kaj per 5 se mankas finaĵo. Sub ĉiu vorto ni povas meti ciferon. Vi provu:

A.- "Iam" 5, ĉar ne estas finaĵo, "ie" 4, ĉar estas la finaĵo e, "estis" 0, ĉar temas pri la kernvorto, kiel ni ĵus vidis, kun la adjektivoj "alta kaj ovala".

Cl.- Sub tiuj du adjektivoj vi do ankaŭ metu la ciferon 0 por komprenigi, ke ili formas tuton kun la helpverbo estis.

A.- Korbo ricevu la ciferon 1 ĉar ĝi estas la subjekto, "duonmetron" 2, ĉar estas la finaĵo n, "iom" 5, ĉar ne estas finaĵo, "longe" 4 ĉar estas la finaĵo e.

Cl.- La vorton "kaj" povus anstataŭi komo. Tial ĝi ne ricevu kodciferon. Ĝi apartenas al la punktado. Diru la pensunuon sen la vorto "kaj" kun kaj sen la helpverbo "estis".

A.- "Iam, ie estis korbo, duonmetron alta, iom longe ovala". "Iam, ie korbo duonmetron altis, iom longe ovalis."

Cl.- Antaŭ ol antaŭeniri en la studadon de la teksto ni ankoraŭ ekzamenu la vorton "duonmetro". Kiom mezuras laŭ centimetroj la alteco de korbo "duonmetro alta".

A.- 200 centimetrojn.

Cl.- Kiom mezuras korbo duonmetron alta.

A.- 50 centimetrojn.

Cl.- Por reveni al la metroj, la unua estus alta je du metroj, la dua estus alta je duona metro.

A.- Mi ne imagus, kiom da ekzerco-ebloj donis tiu unua pensunujo.

Cl.- Kun progresantoj ni trankvile antaŭeniras tiel, ĝis kiam finiĝas la trastudo de paragrafo. Tiam alvenas la momento ĝin rediri aŭ reskribi diversmaniere. Ĉiu, laŭ sia memorkapablo, lingvonivelo, provas alporti almenaŭ po unu ŝanĝon en ĉiu pensunujo, sen ŝanĝi ties signifon. Tiu ekzerco komprenigas, ke ankaŭ Baghy elektis inter tiuj diversaj solvoj serĉante la por li plej eŭfoniajn, evitante monotonecon, internajn rimojn kaj obeante la regulon, kiun li malkovris kun Edmond Privat, ke la subjekto ĝenerale sekvas netransitivan verbon kaj antaŭas transitivan verbon.

A.- La venontan semajnon en oka rendezuo didaktika ni revenos al tiu ĉi teksto "La Teatra Korbo" de Julio BAGHY.

Cl.- Volonte ni sendos fotokopion de la tekstoj de niaj rendezuoj didaktikaj al la aŭdantoj, kiuj ilin petos al Svisa Radio Internacia.

A.- Claude kaj Andr  e Gacond diras al vi: ĝis la reaŭdo!